
sub la suda kruco ★

# ESPERANTO



## UK en Roterdamo

## Nov-Zelanda nacia elekto

## Ekzamenoj de AEA

## Somerkursaro 2009 en Sidnejo

## Crazy English

oficiala organo de la aŭstralia kaj nov-zelanda esperanto-asocioj
volumo 16[5] • numero 95 • septembro–oktobro 2008
ISSN 1038-9380




# ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

Redaktoroj | Chris Krägeloh & Ŝandor Monostori
Kontaktadreso | **esk@esperanto.org.au**
P.O.Box 1097
Bendigo Central Vic 3552
Australia

## Abonoj & Pasintaj Numeroj

Esperanto Sub La Suda Kruco estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEA).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA | www.esperanto.org.au – info@esperanto.org.au
NZEA | www.esperanto.org.nz – nzea@esperanto.org.nz

## Kiel kontribui al ESK?

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunktoj, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia oficiala kontaktadreso, "esk@esperanto.org.au". Limdato por kontribuoj por la sekva numero:

15 de oktobro 2008

La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

**Por la opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne necese spegulas la opiniojn aŭ de AEA, aŭ de NZEA.**

Copyright @ 2008, AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj.

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio

**Sur la kovrilo**: Nederlando, kie la ĉi-jara UK okazis estas tre fama pro siaj belegaj tulipoj.



5 93a UK – Unikaĵo, UK - Roterdamo





9 **Muziko dum la UK**



10 Komitatana laboro





12 Blindkadukulo en Mirlando






16 Antaŭkongresa ekskurso al Suda Nederlando





18 Nov-Zelanda nacia elekto





20 **Ekzamenoj de AEA**





21 Aŭstralia Somerkursaro de Esperanto en Sydnejo



22 **Crazy English**

# Antaŭparolo

*de Ŝandor Monostori*

Tiu ĉi estas la tria novforma ESK. Intertempe mi ricevis proponojn kaj bonajn ideojn de multaj homoj. Kelkaj bonaj ideoj aperis en la AEA retforumo. Jen kelkaj el la proponoj:

Ni havu regulan parton "Leteroj al ESK". Chris jam komencis tion en la antaŭa ESK, sed ni bezonas leterojn por daŭrigi. La avantaĝo de la leteroj estas, ke ili povas esti mallongaj. Estas malpli timige verki letereton ol verki longan artikolon.

Estus bone havi kontribuaĵojn de diversaj landoj. Rakontoj de eksterlandaj esperantistoj kiuj vizitis Aŭstralion aŭ Nov-Zelandon pri siaj spertoj estus bonvenaj. Ankaŭ kontribuaĵoj de niaj eksterlandaj amikoj povus esti tre interesaj.

Specialajn malnovajn artikolojn indus reaperigi.

Ni ankaŭ bezonas priesperantajn kontribuaĵojn pri gramatikaj problemoj kaj literaturo.

Recenzoj pri novaj filmoj kaj teatraĵoj ankaŭ estus bonvenaj kaj eble diversaj kluboj povus kune verki ion pri eventoj kiuj okazis en siaj ŝtatoj/ urboj/ regionoj.


Esperantigitaj ŝercoj estus amuzaj, kaj estus bona lingva ekzercado eĉ por komencantoj.

La 93a Universala Kongreso de Esperanto okazis de la 19a ĝis la 26a de julio en Roterdamo. La kongresa temo estis "Lingvoj: trezoro de la homaro". UEA ankaŭ celebris sian centjariĝon. Por mi la plej grava afero pri internaciaj Esperanto-kongresoj estas renkontiĝi kun malnovaj amikoj kaj ekhavi novajn amikojn. Mi partoprenis mian unuan Esperanto-kongreson en 1983 (IJK en Debrecen, Hungario) do ĉi-jare estis mia 25a datreveno. Mi renkontiĝis kun grupeto de geamikoj, kun kiuj mi amikiĝis antaŭ 25 jaroj. Ni ĉiuj havas malsaman gepatran lingvon: francan, italan, svedan, polan, flandran kaj hungaran. Dum la kongreso ni bonege fartis kaj multe festis nian kvaron-jarcentan jubileon.

La ĉeftemo de ĉi tiu ESK estas la 93a Universala Kongreso. Laŭ la kongresa libro estis 16 aliĝintoj el Aŭstralio. Kelkaj el la aŭstraliaj partoprenintoj raportas pri siaj dumkongresaj spertoj. ★

*Didier, Elena, Bettan, Ella, Eddy kaj Ŝandor en Roterdamo*





# 93a UK – Unikaĵo

## Estas la jubileo de la centjariĝo de UEA

*de Jennifer Bishop*

Ĉiu UK estas unika pro la nova estraro, la nombro da diversaj partoprenantoj, la programo kaj la loko mem, sed ĉifoje estas la jubileo de la centjariĝo de UEA kies oficejo situas nur dudek minutojn piede for de la kongresejo.

Ĝojigis nin unue, same kiel pasintjare en Jokohamo, eniri la grandan kongresejon por registriĝi kaj saluti tiom da konatuloj el multaj proksimaj kaj foraj landoj. Ĉifoje el Aŭstralio mem ni vidis 13 personojn, multe pli ol antaŭe. Post ĉeesti plurajn UKojn ŝajnas ke la partoprenantoj dividiĝas en 3 interesajn grupojn - movadaj aktivuloj, movadaj partoprenantoj kaj ekskursemuloj, sed ĉiuj havas problemon elekti programerojn sen maltrafi ion speciale allogan. Por ni la ĉefaj rendevuoj temis pri provkantado de Internacia Esperanto Ĥoro kaj fakaj jarkunvenoj.

Tamen aparte de bonaj distraj eventoj ni kaj centoj da aliaj sukcesis ĉeesti brilan ilustritan prelegon de Katalin Kovats kaj Sylvain Lelarge pri Vincent van Gogh kaj historian prezentaĵon de Humphrey Tonkin pri UEA, kun elkora danko de Dr-o Zaleski-Zamenhof mem, nepo de D-ro L. L. Zamenhof . Ekster la kongresejo, ankoraŭ elstaras en mia memoro ankaŭ la tuttaga ekskurso al Hago (Den Haag) kun vizito al la mirinda konstruaĵo, Palaco de Paco, tute taŭga por vizito de esperantistoj. ★

# UK - Roterdamo

## La ekzamenĉambro estis plenplena.

*de Robert Budzul*

Detalojn pri la ĉiutaga programo de la UK mi tute ne volas, nek intencas skribi. Tiujn detalojn oni povas alialoke trovi - sed impresojn pri la UK de iu, kiu estis tie ne estas tiel facile troveblaj.

Unusemajnan kunvenon priskribi per kelkaj vortoj ne estas tiel facile.


La urbo - Roterdamo. Vere urbo de multaj kulturoj. Verŝajne multaj rifuĝintoj sed ankaŭ multaj, kiuj venas el la iamaj kolonioj nederlandaj en Sud-Ameriko. Kaj tiun multkulturecon oni ĉie vidas.

Mi alvenis unu tagon antaŭ la unua tago de la kongreso kaj trovis tre afablajn trinkejojn, kafejojn, kaj restoraciojn en la cirkaŭaĵo de la kongresejo. Mi iel dubas, ke la kongresanoj havis la saman bonŝancon, ĉar en la cirkaŭaĵo de la *Hilton* hotelo, kie multaj kongresanoj loĝis, estis nur bruaj trinkejoj, ne taŭgaj por Esperantumi.

En Aŭstralio oni neofte, eble neniam, havas okazon fari la ILEI ekzamenon, do mi decidis aliĝi. Estis elekto inter la baza kaj la meza. Verŝajne ne estas vorto kun *za* finaĵo por priskribi iun pli altanivelan kurson, do oni ne ofertis tiun.

Mi iomete maltrakviliĝis kiam Atilio, kiu instruis en Hobarto antaŭ du jaroj, demandis, ĉu mi scias ion pri la historio de Esperanto. Jes, ne estas nur lingva ekzameno, estas ankaŭ demandoj pri la kulturo. Sed tiu parto ne estas tiel granda, do mi malgraŭ tio elektis la mezan. Fakte je la unua tago tute ne estis demandoj pri la historio de Esperanto, do mi ankoraŭ havis tempon legi en Vikipedio pri Esperantaj aŭtoroj kaj Idistoj, kiuj sendube estos inter la demandoj.

*Ho, li ekvidis la t-ĉemizon.*



La ekzamenĉambro estis plenplena. Eĉ tiuj, kiuj faris la bazan ŝajne (al mi) tre bone regis la lingvon... aŭ eble nur tiuj, kiuj bone parolis multe paroladis antaŭ la ekzameno.

Vere estas afero, kiu daŭras tutkongrese. La unuan tagon okazas la antaŭtesto. Unu-hora, testo pri gramatiko (plejparte finaĵoj) kaj vortstoko. Mi miris, ke ili trovis vortojn, kiujn mi tute ne konis, kaj kiujn mi ankaŭ ne povis facile konjekti el aliaj lingvoj. Ĉu vi scivolemas kiujn? Linko, flako, tempio, vualo...

Tiuj, kiuj sukcesis, rajtis fari la sekvontan parton. Mi tute ne atendis, ke ĝi daŭrus tiel longe - pli ol tri horoj. La terura parto estis la aŭskulta parto. Aŭskulti tekston kaj poste skribi la respondojn al demandoj. Kaj ankaŭ rerakonti la tekston (skribe). Terure, ĉar la enhavo de la teksto estis tiel profunda! Iel ne juste, ĉar tiuj,

*Esperantistoj amuziĝas for de la kongresejo..*




kiuj tre bone memoras aŭ tre rapide skribas, havas avantaĝon.

Same kiel post la unua test-tago, oni poste metis la nomojn de la sukcesaj partoprenantoj sur tabulon. Mi ĝojis vidi la mian.

La tria tago - la parola testo. La tri ekzamenantoj estis el malsamaj landoj, kaj pro tio estas malfacile okazigi la ekzamenon en Aŭstralio... Ili faris demandojn kaj oni devis kiel eble plej multvorte kaj plej bone respondi. Oni devis ankaŭ priskribi bildon.

Kaj pri la kongreso mem? Nu, la unuan tagon ĉiam okazas la movada foiro kune kun la interkona vespero. Tio ĉiam estas interesa. Ĉirkaŭ la *grandeta* halo estis budoj de diversaj Esperantaj organizoj... kaj meze babiladis la kongresanoj. Teorie ili ankaŭ interkonatiĝas reciproke. Sed fakte ili plej ofte babiladas kun konatuloj el pasintaj kongresoj. Sed eble, ĉiuj, kiuj provus, povus konatiĝi kun multaj.

Ĉi-jare al mi ŝajnis esti problemo, ke estis tiom da homoj ĉirkaŭantaj la budojn, ke ne eblis longe babili kun la helpantoj ĉe la budoj - ili estis tro okupitaj.

Aŭstralio fakte havis du *budojn*. Mi skribis la vorton *budojn* kursive ĉar unu budo estis oficiala, la alia estis provizore starigita sur du el la tabloj meze de la ĉambro; tabloj ĉe kiuj la babilantaj kongresanoj trinkis.

La oficiala budo disdonis informon pri la somerkursaro kaj la novan eldonon de ESK. La alia estis de Marcel Leereveld, kaj li vendis sian libron pri gramatiko; verŝajne li ankaŭ parolis pri la prelegoj, kiujn li donos. Fakte, lia budo estis tiel provizora (do verŝajne vere neoficiala), ke mi atendis, ke se oni vidus tion, oni diros, ke li ne rajtas tion fari. Tion mi ankaŭ al miaj amikoj diris, kaj unu el ili ridis dirante, ke li ĵus vidis, ke Osmo Buller kun Marcel babilis kaj Marcel ankoraŭ havas sian budon.

Krom la prelegoj, dum la kongreso estis balo. Ĉi-jare ege bona. Sufiĉe granda ejo kun diskoludisto, kiu ludis bone elektitajn kantojn - kaj Esperantajn kaj nacilingvajn. Kaj ankaŭ estis teko, kie oni povis aĉeti trinkaĵojn. Mi povas vidi, ke la homoj vere ĝuis la etoson. Mi kredas, ke balon oni povus organizi dufoje dum la kongreso.

Hazarde ni aŭdis pri nekongresa koncerto de Jomo en iu trinkejo iom for de la kongresejo. Vere estis bone ĉeesti koncerton en ejo de la urbo, kiu ne estas ligita kun la kongreso. Do ĝi fariĝis ekster-Esperantuja kaj ne nur iu aĵo de la Esperanta geto.

La internacia vespero iom fiaskis pro la malgrandeco de la koncertejo. Multaj povis nur rigardi ĝin en apuda ĉambro sur ekranoj. Tie tute mankis la etoso de la koncertejo.

Unu tagon mi fotiĝis kun la nepo de Zamenhof, kiu ĉiam estas speciala gasto de la UK. Mi iom hezitis alproksimiĝi al li, sed miaj amikoj trankviligis min dirante, ke li estas tre afabla homo.

Alian vesperon mi kaj kelkaj amikoj aĉetis kolbason, panon kaj drinkaĵojn en supermerkato, kaj sidiĝis sur benkon apud la kongresejo. De tie ni salutis la kongresanojn kaj invitis ilin babili kaj trinki. Ege interesa vespero. Finfine mi tiel povis renkonti, inter multaj aliaj, nian najbaran Esperantiston el Indonezio - Hazari. Eble la LKK devus pensi pri kiel faciligi vesperan renkontiĝon inter Esperantistoj? La lokaj leĝoj kaj la vetero ne ĉiam ebligos ke oni povu fari kiel ni.

Por mi la UK ĉiam estas, antaŭ ĉio, okazo por renkonti Esperantistojn kaj uzi la lingvon, do estis strange por mi kiam mi estis en la fervoja stacidomo kaj iu virino (ne anglalingva) ne sciis kiel enviciĝi. Mi devus klarigi, ke la kongresanoj ofte portas siajn nomŝildojn ekster la kongresejo. Pro tio mi povis rekoni, ke ŝi estas Esperantisto. Sed kiel ĉiam, mi estis sen ŝildo. Nu mi klarigis al ŝi, esperantlingve, kion fari, sed ŝi respondis al mi anglalingve (kvankam ni eĉ ne estis en anglalingva lando)! Mi do demandis Esperante, ĉu ŝi ne parolas Esperanton kaj ŝi resondis, ke jes, ŝi parolas Esperanton - sed ankoraŭ angle! Ŝajnas, ke estas kelkaj Esperantistoj, kiuj nur parolas la lingvon en la geto Esperanta de la kongresejo - aŭ eble nur kun aliaj forvagintaj el la geto, kiuj ankaŭ portas la ŝildon de la geto... Ĉu eble en la estonteco dum UK oni havos stelforman sildon?... ne verdan sed flavan...?★

*En la balo Zamenhof montras kiel oni devus fari..*



# Muziko dum la UK

*de Alan Bishop*

Muzikmemorindoj por mi estis la tri koncertoj de Jomart kaj Nataŝa (kaj ilia filino Karina), Jomo, kaj Akordo. Ne forgesita ankaŭ estas la bando de la Nederlandaj Antiloj kiu frapis niajn orelojn per siaj brilaj karibaj ritmoj je la fino de la *Nacia Vespero*. Dum la kutima vespera balo ni ankaŭ dancis al la nekutima, sed tre vigliga, muziko de la fama juna diskoludisto Leo Sakaguchi. Tiel mi pasigis la UK-n aŭskultante.

Sed mi ankaŭ devis kontribui muzike al la programo, per mia muzika prelegeto dum *Kleriga Lundo*, por la jarkunveno de Muzika Esperanto-Ligo (MEL) (mi estas prezidanto), kaj per mia gvidado de la Internacia Esperanto-Ĥoro. Dum la Jarkunveno membriĝis 35 muzikamantoj el 18 landoj por diskuti aferojn kiel la kreado de interreta hejmpaĝo por MEL, kaj la disvastigo de kantmuziko inter la membroj. La ĥoro estis refoje populara afero, kaj partoprenis pli ol 60 homoj dum la semajno. Fine, dum la *Internacia Arta Vespero* la ĥoro kantis belege pro 40 entuziasmaj voĉoj (bv vidi suban foton). Unu kanto estis "Esperanta Lando" verkita de Samuel McBurney, aŭstraliano kiu vivis de 1847 ĝis 1909. Li estis ankaŭ sekretario de la Melburna Esperanto-Asocio dum la fruaj jaroj de la 20a jarcento.

Pro ilia granda helpo mi tre dankas mian edzinon (sekretario de MEL, kaj kantistino), Jesuo de la Heras (kantisto kaj redakto de MUZIKO, la organo de MEL), Ian Fantom (piano), Tazima Mayako kiu kantis kaj ludis ŝamisenon, kaj Paŭlo Gorny kiu multe helpis pri la administrado de la ĥoro. Sen ilia helpo, nenio funkciintus!

Ĝis Bjalistoko! ★



*Alan dirigentas kaj Jennifer kantas en la Internacia Esperanto-Ĥoro*



Modernaj kubformaj loĝejoj en Roterdamo

# Komitatana laboro

*de Ŝandor Monostori*

Mi reprezentis Aŭstralion kiel *Komitatano A* dum la Universala Kongreso. (*Komitatanon A* nomas la landaj asocioj proporcie de la membro-nombro.) Mi alvenis nur je la mateno de dimanĉo, tiel mi ne povis ĉeesti dum la unua komitatkunsido, kiu okazis sabate.

Dum la semajno okazis ok kunsidoj de subkomitatoj pri diversaj terenoj (junularo, informado, financo/administrado, landa agado, kulturo, edukado, scienca/faka agado kaj eksteraj rilatoj). Ĉiuj komitatanoj rajtis elekti kiujn subkomitatajn kunsidojn ili volis partopreni. La subkomitataj kunsidoj estis malfermataj por ĉiuj kongresanoj. La subkomitatoj faris siajn proponojn, kiuj estis prezentataj dum la dua granda komitatkunsido vendredon, kie ni voĉdonis pri la akcepto de la proponoj de la subkomitatoj.

Mi partoprenis la kunsidojn de subkomitatoj pri scienca/faka agado kaj eksteraj rilatoj. Mi havis la impreson, ke la demografia pliaĝiĝo kaj malkresko de la membraro estas ĝenerala fenomeno en la plimulto de fakaj organizaĵoj kaj landaj asocioj. Estis proponate, ke anstataŭ havi apartajn unuopajn modestajn fakkongresojn estus pli bone okazigi multfakajn kongresojn por stimuli interfakan dialogon. Mi ankaŭ partoprenis la kunvenon de UMEA (Universala Medicina Esperanto Asocio), kie oni havis similajn ideojn pri interfakaj kongresoj. Estas problemo, ke fakuloj de iu-ajn tereno praktike ne povas akiri novan scion pere de Esperanto de sia propra fako. La ĉefa rolo de diversaj esperantistaj fakuloj en nia komputiligita 21a jarcento povus esti informado de la Esperantistaro pri siaj fakoj pere de interreto, ĉefe Vikipedio.

Jen kelkaj aliaj proponoj akceptitaj dum la vendreda komitatkunsido, kiujn mi trovas menciindaj:



Kongresejo en Roterdamo

· plialtiĝo de unujara UEA-kotizo al € 59 de € 58.

· ŝanĝi la dumvivan kotizon al 20-oblo de MA-kotozo anstataŭ 25-oblo.

· la agado ĉe Unuiĝintaj Nacioj estu daŭrigata simile al la pasinta jaro

· UEA proponu al Unuiĝintaj Nacioj lanĉi "Internacian Jardekon de lingvoj"

· UEA/ILEI pli atente zorgu pri instruado celita al adoleskuloj kaj plenkreskuloj

· dum Universalaj Kongresoj estu trejnseminarioj pri elektitaj aspektoj de informado

· dum Universalaj Kongresoj oni klopodu aranĝi kelkajn esperantlingvajn muzikajn koncertojn al neesperantista publiko

· okazu interŝanĝo de instruistoj, kiuj povus helpi tiujn landajn asociojn, ĉe kiuj mankas kapablaj instruistoj

· LKK-oj de ontaj UK-oj pli vigle kunlaboru kun loka junularo kaj kun TEJO aldoni pli da programeroj per aŭ porjunularaj.

# Wonderland

## Blindkadukulo en Mirlando

*de Max Wearing*

BK was not totally blind or decrepit – only three quarters. He was still insurable for travel and eligible for help and guidance within airports. What's more, the Dua Bulteno of the Universala Kongreso contained excellent directions for getting an express train from the Amsterdam airport to Rotterdam's central station, only two stops on the metro from the Congress Centre. There he would only need to take a lift up to street level. Being nearly blind, however, he didn't see the lift and had to struggle up by a roundabout route using stairs. It seemed that half the people in the station wanted to carry his bags for him – among them even a thoughtful elderly woman! BK began to feel he had arrived in a strange new Wonderland of kindness and courtesy.

The July morning (summer in the north!) was even colder and wetter than the mid-winter mornings he'd just left in Adelaide. There were no cars in the city's main street, which he now had to cross to get to his hotel, the closest to the Congress Centre that the Congress Secretary could book him into.

This main street in Rotterdam had lanes not only for cars and trams but also, next to the pavement on each side, a completely separate lane for bicycles. To BK it always seemed that there were more cyclists than motorists. Bikes not in use stood unlocked at the side of the lane. Cyclists obviously trusted one another more than in Australia. Though most people could speak English, they seemed distinctly different from English speakers in Australia, New Zealand, the US or the UK. Social norms were different here. More and more BK felt himself to be in a rich, trusting Wonderland.

The hotel's breakfast room had a larger array of foods than he'd ever seen in a hotel before and among the guests were several eminent Esperantists (such as Dr Zaleski-Zamenhof) and some notable Australians (such as Marcel and Alida Leereveld). The Congress Centre was part of a tall modern building. Its entrance was at the top of a huge pile of stairs reminiscent of those of the earliest Egyptian

*Julian Hernandez Angulo el Kubo, Max Wearing el Aŭstralio kaj Mario Müller el Germanio*



large platform in front of the Centre's revolving doors, but no escalator to carry them down again.

The reception space of the kongresejo was palatial, with a central water pool surrounded by a wall just the right height to sit on. It stood next to stairs and a lift - unnecessary for kongresanoj because all their meeting rooms and halls (named after famous Esperantists of the past) were on the same level as the reception hall (named Zamenhof for the duration of the congress). The reception space was mostly standing room with booths and tables and a huge display board (rendevua tabulo) to which kongresanoj could attach messages for one another with the help of an extremely competent team of volunteers seated nearby. All teams of helpers in the Zamenhof space, in fact, were incredibly proficient throughout the whole congress, whether distributing the daily congress bulletin, selling E-stamps, or attending to the many other needs of the kongresanoj.

A very pleasing aspect of this congress was the effort to use the event as an opportun to promote the language to the outside world. The building's dominant position in the city' centre, was used to display huge E-flags on which ESPERANTO was written in large whit letters. Moreover, the daily congress bulletin published a long list of media outlets used to promote the event. Another publicity coup was having the Netherlands postal service issu a new E-postage stamp.

Perhaps the greatest pleasure for a seasoned participant of E-events is the joyful resumption of friendships begun in earlier years. Next greatest is the abundance of progran items available (nearly 200 of them). For BK, the most memorable in this particular congress were a performance by John Wells of speech sounds in languages all round the world, an introduction by Ulrich Lins to the history of UEA, and wise observations by Humphrey Tonkin on present and future challenges for the E-movement. Fortunately all three o these scholars have just published books on these subjects, and we can order them from the UEA Libroservo. BK was also impressed by a lively lecture delivered by Geoffrey Greatrex, a young Canadian professor with an Oxford PhD in Classics, undoubtedly one of E-d great orators of the future.

Not every aspect of the congress was perfect. A shock on the first day was the discovery that there was not enough space for all the kongresanoj to attend the Inaugural Meeting. Large numbers had to watch and listen to it outside the hall on closed-circuit TV screens, and as the week progressed, it became apparent that several other meeting rooms also had insufficient seating for their audiences - this in a congress with only 1800 participants, when the average attendance for the previous 25 congresses was 2,350!

Another unfortunate opening was that of the bookshop. The book display was magnificent, but unfortunately the customers began entering with their bags long before the arriva of the team for storing those bags outside. When the bookshop manager arrived he bawle out the bag-carrying customers in a tone indicating that they were no better than a pack o scurvy dogs. Unfortunately, not all Esperantists are entirely trustworthy. Some may even b kleptomaniacs. BK remembered the disappearance in one UK of a huge and beautiful ma of Adelaide for promoting the UK there in the following year. He hopes that in future congresses, pre-planning will ensure that the bag-storing team will be well briefed and in plac long before the arrival of the public.

Yet another shocking opening occurred at a major concert the following evening. A packed audience had to sit waiting half an hour while the sound technicians adjusted the levels of the performers' microphones and speakers. The musicians dealt with the situatio

in as professional a manner as possible, but because of lost time, they couldn't finish their whole program.

On the subject of music, the Congress ended as usual with the audience singing La Espero – mercifully within a range set not exclusively for trained sopranos and tenors but for the majority of voices, so that "la bela sonĝo de homaro por eterna ben efektiviĝos" did not end (as it has sometimes done) in squawks and splutters.

Outside, the kongresanoj walked into the largest and loudest international carnival that BK had ever seen or heard. The main street of Rotterdam had been closed to motor traffic and was now filled with what seemed like hundreds of thousands (if not millions) of revellers, mostly black. The kongresejo was locked but the E-flags and banners in front of it remained in place until every last reveller had left.

Not surprisingly there was an abundance of police officers, but they stood unarmed, relaxed and totally informal in a way that Australian police haven't done for years. The crowds were orderly, but the street was littered almost knee-deep with empty plastic cups and bottles and fast-food wrappings. City Council regulations had decreed that during the carnival drinks be sold only in plastic – to avoid the danger of broken glass!


As if by magic, by the end of breakfast next morning the street was entirely clear of both revellers and rubbish. It had been swept as clean as a central square in Switzerland after a snowfall. Rotterdam as a mysterious Wonderland of orderliness, goodwill and helpfulness will long linger in the memory of BK.

Will UEA and the UK last another 100 years? It is said that there are now more people learning Eo through the internet than through face-to-face teaching and attendance at E-events; and we hear already that the organizers of these courses are beginning to arrange events for their students to interact face-to-face as well as through the net. How will this phenomenon affect future UKs? In their choice of a venue with meeting spaces of inadequate size, the organizers of the Rotterdam UK seemed to presume that they were preparing for a congress of about 1000 (not the usual 2000 or more). Did they think that interest in the UKs is declining? – that the UK will soon become merely an internet phenomenon that we participate in at home? Was their choice made deliberately to condition Esperantists to a bleak future of viewing proceedings only through video screens?

I hope that E-ists in Bialystok don't allow the event to decline in this direction. My experience of Polish enterprise, determination, and sound judgment leads me to believe that next year's UK in Bialystok will see a return to the kind of hope, faith, and generosity of spirit that will result in meticulous planning for maintaining our long feted Pentekosta Ĝojo for generations to come.

Bonan vojaĝon! Ĝis la revido en Bjalistoko! ★

*Walentyna Fiszer-Dolinska el Bjalistoko kaj Max*



61a IFEF-Kongreso - Triesto, Italio 23-29 majo 2009
Triesto atendas Vin! Maro, montoj, milda temperaturo kaj... granda festado okaze de la 100-jariĝo de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio: ĉio ĉi je via dispono! Fakaj (kaj ne-fakaj) prelegoj, konatiĝo kun loka kulturo, ekskursoj province kaj regione en eksterordinara esperanta etoso: bonvenon al ĉiuj esperantistoj-fervojistoj kaj saman elkoran bonvenon ankau al ĉiuj NE-fervojistaj esperantistoj! Pliaj informoj haveblas cxe www.ifef.net kaj Triesta Esperanto-Asocio: noredv@tele2.it kaj testudo.ts@gmail.com

comune di trieste
assessorato alla cultura

TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
lanĉas Internacian Konkurson - jaro 2008
pri la temo

# Kristnasko: bilde kaj poezie

Estas invitataj partopreni geknaboj el la tuta mondo, kun aĝo de 6 ĝis 14 jaroj, kiuj sendu, ĝis la **10a de novembro 2008**, siajn verkojn al la jena adreso:

**ESPERANTO TRIESTE - C.P. 601 Trieste Centro**
**IT-34132 TRIESTE - ITALIA**



Oni rajtas kontribui per unu aŭ pli da verkoj pri la supre indikita temo, en la kategorio:

1) desegnaĵo, maksimume unu A4-formata folio;
2) poeziaĵo.

La desegnaĵo havu komenton aŭ frazon en la internacia lingvo esperanto kaj en la gepatra lingvo de la aŭtoro.

La poeziaĵo estu en la internacia lingvo esperanto kaj en la gepatra lingvo de la aŭtor/in/o.

Por ĉiu verko estu ankaŭ indikitaj:

* persona kaj familia nomoj;
* aĝo;
* lernejo kaj klaso;
* poŝta adreso.

Se eblas, bonvolu aldoni malgrandan foton de la aŭtor/in/o.

Ĉiuj konkursaĵoj prezentiĝos al publiko dum la kristnaska periodo 2008.

La vizitontoj kaj elektota ĵurio donos poentojn al la plej bela verko el la du kategorioj.

Oni anoncos la premiitojn, laŭ kategorio kaj aĝo (de 6 ĝis 8 jaroj; de 9 ĝis 11 jaroj; de 12 ĝis 14 jaroj) enkadre de publika ceremonio en Triesto.

Por kromaj detaloj/informoj: noredv@tele2.it aŭ testudo.ts@gmail.com



# Suda Nederlando

## Antaŭkongresa ekskurso

*de Chris Holliss*

Antaŭ la Roterdama UK, nia grupeto de 13 esperantistoj el Japanio, Israelo, Rusio, Brazilo, Francio, Britio kaj Aŭstralio pasigis kvin malstreĉajn tagojn en Wemeldinge, unu de la plej belegaj vilaĝoj de Zelando. Ĝi troviĝas sude, apud la marbordo. La loko estas tre populara, ofte vizitata de ripozemaj nederlandanoj. We-




meldinge estas ĉarmega, tre ordema vilaĝo de Nederlando. Ĝi havas vidindajn, plejparte du nivelajn domojn kaj amason de floroj en la ĝardenoj. La fenestroj de ĉiuj domoj estas dekoraci-

itaj per diversaj ornamaĵoj. La kurtenoj de la domoj estas malfermitaj por fiere montri al la mondo la perfektan meblo-aranĝon de la ĉambroj.

Sed kie estas la loĝantoj?

Ni apenaŭ vidis loĝantojn en la vilaĝeto. Nia bonkora ŝoforo, Ronny, klarigis ke multaj de la domoj estas semajnfinejoj.

Ankaŭ plaĉis al ni, la agrabla taga ekskurso, kiun Hanso, nia mirinde informita gvidanto tre bone aranĝis. Kun li, ni vizitis diversajn kaj histori-riĉajn lokojn i.a. Middleburg, memorinda pri sia brokantadejo; Vlissingham, havanta muzeon pri marinista historio de Zelando; Terneuzen, la pordego al Flandrio kie funkcias la plej multe uzataj kluzoj de la mondo; Bruĝo, fascina mezepoka urbo de Belgio kaj Kinderdijk, kiu havas multajn malnovajn ventomuelejojn.

La zelanda kamparo estas absolute plata, tamen tre interesa. Ĝi situas kelkajn metrojn sub marnivelo. La lando estas dividita en malgrandajn kvadratajn kampojn kaj ĉirkaŭ la kvar flankoj fluas rivereto; la rezulto de senĉesa pumpada sistemo kiu sekigas la kampojn. Kompreneble, la farmoj kreskigas fruktojn, grenojn, legomojn, florojn kaj paŝtas ŝafojn, bovojn, kaprojn kaj ĉevalojn. Plaĉis al mi rigardi, ĉe la anguloj de la kampoj, la birdojn: anasojn, anserojn, kaj cignojn, kiuj plonĝis kaj naĝis en la rivereto.



Sur la kampoj estas multaj modernaj ventomuelejoj por kapti energion sed, laŭ mi, ili ne malpliigas la belecon de Zelando. La nederlandanoj ĉiam kultivis kaj bone prizorgis sian landon kaj medion. ★



*Bruĝo*



La Nov-Zelanda parlamentejo (Abelujo)

# Nov-Zelanda nacia elekto

## Ĉu rugbeo decidigos rezulton?

*de David Ryan*

La nuna reganta partio en la parlamento de Nov-Zelando okazigos nacian elekton la 8-an de novembro de ĉi tiu jaro. Kiam ajn okazas elekto en Nov-Zelando, oni ofte demandas: ĉu rugbeo decidigos la rezulton de la elekto?

Mi klarigu tiel: Kiel eble ĉiuj jam scias, rugbeo estas tre grava afero por multaj nov-zelandanoj, preskaŭ kiel religio. Nov-Zelando havas la plej bonan teamon de la tuta mondo -karaj aŭstralianoj, mi ne volas komenci debaton pri tiu aserto! Tamen, kelkfoje, ni malvenkas kaj, kiam ajn ni malvenkas (ne ofte), estas kiel granda nacia katastrofo, precipe kiam aŭstralianoj venkas nin (ne ofte!).

Tial, kiam temas pri elektaj aferoj, oni diras ke, se la nacia teamo malvenkos en grava matĉo dum la kampanja periodo antaŭ la elekta tago, ĉiuj estos tiel malkontentaj, ke ili sentos kvazaŭ la tuta lando suferus grandan problemon kaj, pro tio, ili ne volos voĉdoni favore al la reganta partio (kvazaŭ tiu partio kulpus pro la




malvenko en rugbea matĉo). Eble vi pensas ke tio estas troigo. Sed, ne – rugbeo tiel gravas en Nov-Zelando ke nia tuta memestimo kaj interna sento de sukceso kiel nacio preskaŭ dependas de la rezulto de matĉo. Se nia nacia teamo malvenkas dum matĉo, taĝurnaloj kaj televidaj kaj radiaj programoj de la sekvaj tagoj komentas senĉese pri tio – forgesu pri militoj aŭ katastrofoj en aliaj partoj de la mondo, gravas nur la fakto ke nia nacia teamo malvenkis.

Certe la tago kiun la reganta partio elektos por la venonta nacia elekto dependos de dato de rugbea matĉo. La reganta partio ne volos elekti saman tagon kiam okazos grava matĉo, pro la fakto ke multaj personoj vere ne interesiĝos dum tiu tago pri politikaj aferoj kaj eĉ multaj personoj eble ne restos en hejma urbo sed vojaĝos al alia urbo kie okazos matĉo, kio iom malfaciligos la voĉdonan procezon. Certe, tiun vesperon post la fermo de la balotbudoj, multaj nov-zelandanoj spektos la matĉon sur televido kaj ili enlitiĝos sciante kiu gajnis. Nur la postan tagon ili verŝajne legos en taĝurnalo aŭ aŭskultos per radio kiu gajnis en la nacia elekto.★


*__David Ryan__ estas la prezidanto de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio.*

# Ekzamenoj de AEA

*de Trevor Steele*

Laŭ peto de la estraro mi transprenis la ekzamenan komisionon de AEA. Sed tio ne signifas, ke la antaŭa komisionestro, Marcel Leereveld, ne plu aktivas. Marcel enkondukis tri "internivelajn" ekzamenojn aldone al la tradiciaj. Marcel nomis la novajn *baza*, *meza*, kaj *alta*.

Tiuj, kiuj deziras daŭrigi/fari la ekzamenojn enkondukitajn de Marcel, bonvolu fari tion. Lia adreso estas 12 Heather Grove, Belgrave South Vic. 3160 kaj lia retadreso estas marcel@melburno.org.au. Marcel informis min, ke ankoraŭ ne publikiĝis la nomoj de la sekvaj sukcesintoj ĉe ekzamenoj en 2006 kaj 2007. *Baza*: Annolies Truman, Dianne Mitchell, Christine Hollis, Martin Gray. *Meza*: Dominic Else, Hugh Malcolm, Heather Heldzingen. *Alta*: Ivan Heldzingen. *Elementa*: Heather Heldzingen. *Norma supera*: Matthew Maguire, Debra McCarney, Bernie Heinze, Miranda Lutz.



Mi tamen intencas daŭrigi laŭ la tradicia sistemo, kvankam per novaj versioj de la ekzamenoj, kiuj portas la nomojn *elementa, norma supera, kaj klereca*. Ekde nun oni ne skribos angle (kvankam por komencantoj la instrukcioj estas en la angla kaj en Esperanto), eĉ je la *elementa* nivelo. Tio ja havas siajn avantaĝojn, ĉar ĝis nun la homoj, kiuj faris tiujn novajn ekzamenojn, estas ĉiuj francligvaj: Sandrine Martin (Nova Kaledonio) kaj Renata Chassard (Francio) akiris la *norman superan*, kaj Patrick Neveux kaj Leonie Schaup (ambaŭ el Nova Kaledonio) la *elementan*.

Ne estas speciala vortstoko nek aro da gramatikaĵoj por la *elementa* aŭ la *norma supera*: ĉar oni faras hejme (kaj havas tri monatojn por tion plenumi) kaj rajtas ĉiam konsulti vortaron aŭ lernolibron. Teorie oni konas la tutan gramatikon kaj vortstokon. Sed ne supozu, ke oni sukcesos sen bona regado de la lingvo!

La *klereca* estas tre altnivela ekzameno. Kandidatoj por tio nepre konsultu min antaŭe.

Ĉiuj ekzamenoj estas nun riceveblaj kaj fareblaj rete (uzu trevor.steele99@gmail.com), sed ankaŭ papere (skribu al Trevor Steele / 9 Vicar Street / Gilles Plains SA 5086).

La someraj lernejoj servas kiel ŝanco fari la parolajn ekzamenojn, kaj tiuj dezirantaj diskuton pri gramatiko konsultu min. ★

**The Australian Esperanto Association**

**Invites you to attend the**

# *24th AUSTRALIAN ESPERANTO SUMMER SCHOOL*

**from Sunday 11th (pm) until Saturday 24th (am) January, 2009**

**to be held at**

## "International House"

**the accommodation for international students of Sydney University, located in near the centre of Sydney.**
**A Two Week Intensive Course - Immerse Yourself in Esperanto!**
**Enjoy two weeks of study, social activities, and Esperanto culture in beautiful Sydney.**
**January is a great time to visit Sydney as there is so much happening. As well as the beaches, restaurants and sport, January sees the Festival of Sydney which for three weeks each January offers a rich program of around 80 events involving upwards of 500 artists from Australia and abroad covering dance, theatre, music, visual arts, cross media and forums. For more information (www.sydneyfestival.org.au)**
**Details of excursions and programme will be published soon.**

**To ask a question, or express interest in taking part in the course, please send a message to :**

aesk@esperanto.org.au

**Internet page:** www.aesk.esperanto.org.au

2009 Esperanto course prices.

1) Courses ONLY, not staying at 'International House' = "Day Students"
2) Accomodation ONLY at 'International House' = "Social Stayer"
3) Courses and accomodation at 'International House' = "Full Bundle"

*1)=DAY STUDENT (COURSE ONLY)

| | Pay by 30/11/08 | from 01/12/08 |
|---|---|---|
| AEA Member | $455.00 | $545.00 |
| AEA Member - Concession | $380.00 | $455.00 |
| Non-Member | $500.00 | $600.00 |
| Non-Member - Concession | $420.00 | $505.00 |

*2)=SOCIAL STAYER (ACCOMMODATION ONLY) - DAILY RATE

| | Pay by 30/11/08 | from 01/12/08 |
|---|---|---|
| AEA Member | $91.00/day | $109.00 /day |
| AEA Member - Concession | $83.00 /day | $100.00 /day |
| Non-Member | $100.00 /day | $120.00 /day |
| Non-Member - Concession | $91.00 /day | $109.00 /day |

*3)=FULL BUNDLE PACKAGE (COURSE & ACCOMMODATION) - 14 DAYS

| | Pay by 30/11/08 | from 01/12/08 |
|---|---|---|
| AEA Member | $1,390.00 | $1,670.00 |
| AEA Member - Concession | $1,350.00 | $1,620.00 |
| Non-Member | $1,530.00 | $1,835.00 |
| Non-Member - Concession | $1,485.00 | $1,780.00 |

* EXTRA DAYS (FOR FULL BUNDLE PAYERS) - DAILY RATE

| | Pay by 30/11/08 | from 01/12/08 |
|---|---|---|
| AEA Member | $76.00 /day | $91.00 /day |
| AEA Member - Concession | $74.00 /day | $89.00 /day |
| Non-Member | $91.00 /day | $109.00 /day |
| Non-Member - Concession | $83.00 /day | $100.00 /day |

# Crazy English


## Kiel atingi ke ĉinoj flue parolu la anglan lingvon?

*de Nicole Else*

Ni instigu ilin supreniri sur tegmentojn kaj laŭte krii anglajn vortojn. Ĉu freneza sugesto? Certe ne, laŭ Li Yang. Li Yang naskiĝis en 1969 kaj havis iom da malfacilaĵoj lerni la anglan. Li konstatis, ke helpas kiam li laŭtlegas kaj ke helpas eĉ pli se li laŭte krias. En 1994 li komencis disvastigi sian metodon, nomita "Crazy English". Li Yang ofte prelegis al amasoj da ĉinoj. Li instigas ilin laŭte ripeti anglajn vortojn kaj ankaŭ movi la brakojn. Certe li sukcesas krei entuziasmon.


> **" Li instigas ilin laŭte ripeti anglajn vortojn kaj ankaŭ movi la brakojn."**


Li Yang pensas ke multaj ĉinoj sukcesas kompreni skribitan anglan lingvon, sed ili ne kapablas paroli. Plej multaj ĉinoj ege timas embarason kiam ili eraras kaj ofte preferas silenti ol provi iom paroli la anglan. Tamen en granda grupo kie estas anonimeco la ĉinoj ja konsentas kunkrii kaj do ekzercas la prononcadon. Oni taksas, ke proksimume 30 milionoj da ĉinoj ĉeestis almenaŭ unu prelegon de Li Yang. Antaŭ ne longe li instruis grupon da kuracistoj kiuj bezonos povi esprimi sin en la angla por la 2008 olimpikaj ludoj.



*La granda muro de Ĉinio*

Ŝajne iuj personoj ekhavas pli da memfido post aŭskultado de prelego de Li Yang, sed la metodo instruas nur unuopajn vortojn kaj frazojn kaj ne vere tute fluan parolon.

Li Yang opinias ke ĉinoj bezonas scipovi la anglan por povi pli bone regi la mondon kaj disvastigi la ĉinan kulturon. Li kredas je la supereco de la ĉinoj. Ŝajne multaj ĉinoj ege deziras fariĝi fluaj parolantoj de la angla kaj pretas elspezi multe da mono por tio.

Li Yang estas ĉarma viro kiu sukcesas entuziasmigi amasojn, kiu bone kapablas paroli, kiu provas altigi la memfidon de la ĉinoj, eviti ke ili silentu pro timo de embaraso, sed mi dubas ke lia metodo vere helpas ĉinojn fariĝi fluaj parolantoj de la angla. Li Yang fariĝis fama, sukcesa kaj riĉa, sed mi ja vidas danĝeron ke personoj estos ekspluatataj per promesoj de flua kapablo paroli la anglan. ★

# New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

**www.esperanto.org.nz**
nzea@esperanto.org.nz
0800 350 781

David Ryan | President
*ryangomez@xtra.co.nz*

Chris Krägeloh | Vice-President
*esk@esperanto.org.au*

Donald Rogers | Treasurer
*dero9753@ihug.co.nz*

Bradley McDonald | Secretary
*bradley.m@woosh.co.nz*

Howard Gravatt | Assistant Secretary
*hgravatt@ihug.co.nz*

Erin McGifford | Committee Member
*erin.mcgifford@press.co.nz*

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, answering queries from the public about Esperanto, and organising the annual NZEA conference.

# Australian Esperanto Association

Australian Esperanto Association
PO Box 339
Pascoe Vale South Vic 3044
Australia

**www.esperanto.org.au**
info@esperanto.org.au
(+61 2) 9319 4775

Dianne Lukes | President
*prezidanto@esperanto.org.au*

John Abood | Administrative Director
*admin@esperanto.org.au*

Stephen Pitney | Financial Director
*financoj@esperanto.org.au*

Miranda Lutz | Dir. of Member Services
*servoj@esperanto.org.au*

Jonathan Moylan | Dir. of Promotion
*informado@esperanto.org.au*

Jennifer Bishop | Director of Education
*edukado@esperanto.org.au*

Kay Andersen | Dir. of Implementation
*utiligado@esperanto.org.au*

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster cooperation among Esperanto organisations with similar aims.






WWW.ESPERANTO.ORG.AU • WWW.ESPERANTO.ORG.NZ